

Ankaŭ dum la ferioj

aŭskultu la Esperanto-

elsendojn kaj

skribu al la

stacioj!

Redakanto/Herausgeber:

Ludwig Pickel

Postfach 2113

D-85 Nürnberg 1

Tel. (09 11) 46 36 49; 5142 69

PILO-PRESS

Internacia
Informservo

N-ro 27/1976 - 5 jul 1976
Aperas ĉiusemajne

Socialista Partio Franca dementas

Reago al informo en Pilo-Press N-ro 19/76

Paris (pp) - S-ro Robert Soudant, Saint-Martin, sendis sub la dato de la 30.6.76 jenan leteron:

"Amiko sendis al mi vian bultenon de 10.5.76. Kun grandega miro mi legis asertaĵon de Karl Heinz Müller laŭ kiu "dum kunsido de la Socialista Internacio la socialdemokrataj partioj de Svedio kaj F.R. Germanio subtenis la proponon de la Itala Socialdemokrata Partio pri enkonduko de Esperanto en la internaciajn rilatojn de la Socialista Internacio. Sed (ke) la francaj socialistoj voĉdonis kontraŭ la propono."

Tio tuj ŝajnis al mi nepre malverŝajna ĉar le François Mitterand estas tute favora al Esperanto; 2e Socialista Deputataro proponis leĝon por enkonduki Esperanton en francaj lernejoj duagrada. Sen-dube vi aŭdis pri tiu leĝpropono.

Tamen pri tio mi faris demandon al Sekretario de mia partio. Ĉi-kune fotokopion de respondo kiun mi ricevis - kun traduko kiun mi petas ke vi bonvolu publikigi en Pilo-Press. Antaŭan dankon! Samideanece via R. Soudant, maljuna kaj malnova membro de Socialista Partio."

Kompreneble Pilo-Press volonte represas la respondon de la Socialista Partio, Internacia Sekretariaro, de la 25 de junio 1976 sub la signo MT/FB.

Unue sekvas la franca originalo:

"Cher Camarade, Votre lettre du 12 juin nous a bien été transmise. Après vérification dans les ordres du jour des réunions de l' Internationale Socialiste, il apparaîtrait, qu'à aucun moment le problème de l'esperanto n'a été posé dans les différentes réunions et que, par conséquent, aucun vote positif ou négatif n'a pu être émis.

J'espère très vivement que l'article auquel vous faites référence n'a pas été inspiré par la zèle intempestif d'un camarade du S.P.D. peu favorable à la stratégie de notre parti, mais sans doute par un manque évident d'information, fort compréhensible puisque M. Karl Heinz Müller n'a, à ma connaissance, jamais participé à aucune réunion de l' Internationale Socialiste.

J'espère par ces précisions avoir apaisé votre légitime inquiétude, et je vous prie de croire, Cher Camarade, à l'assurance de mes sentiments socialistes les meilleurs.

sign. subskribo
pour Robert Pontillon
Secrétaire National aux affaires
Internationales."

Kaj nunsekvas la Esperanta traduko:

"Kara Kamarado, via letero de 12 junio estis bone transdonita al mi. Post kontrolado en la tagordoj de la kunsidoj de Socialista Internacio, montriĝas ke neniam problemo de Esperanto estis esplorata dum la diversaj kunsidoj kaj ke konsekvence neniam voĉdonado nek

pozitiva nek negativa povis esti diskonigita.

Mi vigle esperas, ke la artikolo, kiun vi referencas, ne estis inspirata de malkonvena fervoro de kamarado de S.P.D. malmulte favora al la strategio de nia partio, sed verŝajne pro evidenta manko de informado, komprenbla tial kiel S-ro Karl Heinz Müller, laŭ mia scio, neniam ĉeestis al iu ajn kunveno de Socialista Internacio.

Per tiuj precizigoj mi esperas kvietigi vian pravan maltrankviligon, kaj mi petas vin, Kara Kamarado, kredi al miaj plej bonaj socialistaj sentoj.

sign. subskribo
por Robert Pontillon
Nacia Sekretario por
Internaciaj Aferoj"

Ĝenerala Feriosemajno en Svislando

Brugg (pp/eg) - Por la 17-a fojo Svisa Asocio de Esperanto-Fervojistoj (SAEF) okazigos Esperanto-renkontiĝon en Svislando. Geesperantistoj de ĉiu aĝo kaj profesio, inkl. ties familianoj, rajtas partopreni la tradician aranĝon.

En tiu ĉi jaro ĝi efektiviĝos de la 12-a ĝis la 18-a de septembro en la bela feriocentro Magliaso, kiu kuŝas en trankvila parko ĉe la lago de Lugano. La programo ampleksas antaŭtagmezajn Esperanto-lecionojn diversagradajn (libervola partopreno), gvidataj ekskursoj variaj, vesperaj aranĝoj distraj. Naĝejo hejtebla estos senpage je dispono de la feriantoj.

La partopreno estas limigita je 80 personoj. 65 gesamideanoj jam firme aliĝis. Limdato por sin anonci estas la 31-a de julio 1976. Kiu deziras ankoraŭ aliĝi kaj ricevi unu el la modernaj ĉambroj dispo-neblaj senhezite skribu al la sekretario de SAEF: S-ro Ernst Glättli, Laurstr. 17, CH-5200 Brugg, Svislando.

Seminario en la Universitato de Reading

Reading (pp) - Inter la 15-a kaj la 22-a de julio 1976 okazos en la brita universitato de Reading pri la temo "Lingvaj barieroj al orient-okcidenta komunikigo - iliaj kaŭzoj kaj konsekvencoj". La seminario celas kontribui, sur kultura kampo, al la temo "Ĝenerala kunlaboro kaj Sekureco", pritraktota de la amaskunveno de "Ĝenerala Junularo". La seminarion organizas la Komisiono por Eksteraj Rilatoj (KER) de TEJO.

Prila sinteno de la Itala Komunista Partio al Esperanto

Romo (pp) - La konata leĝopropono 342 pri enkonduko de Esperanto en mezgradaj lernejoj italaj ne fariĝis leĝo i.a. ankaŭ pro interveno de komunistaj deputitoj, kiuj postulis modifon de la teksto dum kunsido de la 3-a de julio 1974.

Tedeschi

Dum tiu kunsido la komunista deputito/faris jenan taksadon pri la valoro de Esperanto: 1) Esperanto estas komunikilo proksimume je la sama nivelo de morsa kodo, sen popola substrato, sen propra spirito kaj sen literaturo; 2) post la "pruvoj", fare de Stalin, pri neebleco de internacia artefarita lingvo, neniu serioza diskuto estas farebla kaj farenda ĉi-rilate; 3) por li estas tute indiferentaj la opinioj de lingvistoj, kaj pli ĝenerale de personoj kun formalaj kvalifikoj; 4) ne gravas, ĉu lernanto efektive akiras kapablecon paroli fremdan lingvon, ĉar literaturon li povas tamen legi en la traduko; 5) la lingva elemento havas nenian diskriminacian influon ĉe elmigrintoj, kiuj spertas nur sociajn malfacilaĵojn; 6) tute ne ekzistas en la mondo lingva kaj kultura imperiismo, kaj tiuj, kiuj tion asertas, fidus je la neklereco de la aŭskultantoj.

Prelegantoj serĉataj

Bonn (pp/ht) - La Laborrondo Esperanto, Bonn, sciigas: "En Pilo-Press n-ro 24 ni jam informis pri la nova lernolibro "Praktiku kun ni Esperanton", per kiu ni reformis niajn Esperanto-kursojn por komencantoj. Nun ni konceptis novan modelon por la progresanta kurso. Por malhelpi, ke la interesiĝantoj malaktiviĝas post lernado de Esperanto, ni volas pliintensigi la personajn kaj amikajn kontaktojn inter la jamaj Esperanto-parolantoj kaj la lernantoj. La nova ideo estas trihora bloka kurso por progresantoj kaj progresintoj. La unua horo estos dediĉita nure al progresantoj kun lingvaj kaj konversaciaj ekzercoj, dum la dua horo ĉeestos ankaŭ la progresintoj kaj Esperanto-parolantoj por komuna diskutado, kaj la tria horo estos dediĉita ĉefe al la progresintoj. Tie okazos organiza laboro kaj plua edukado pri Esperanto-kulturo. Konversaciaj temoj estos elektitaj el la kampo de Esperantaj historio, literaturo kaj pensado.

Ĉiun duan semajnon ni volas prezenti prelegon dum la komuna laborhoru pri ajnaj temoj, sed nepre en bonstila Esperanto. Tial ni urĝe serĉas esperantistojn, kiuj volus dum la vintra semestro prelegi dum kvardek ĝis sesdek minutoj pri ajna temo. Rekompenco ni povos oferti senkosten tranokteblecon kun matenmanĝo kaj - laŭdezire - gvidado tra Bonn.

Ni esperas, ke troviĝos kelkaj idealismaj helpemuloj. Interesiĝantoj bonvolu sin anonci laŭeble baldaŭ ĉe Hartmut Trunte, Sebastianstr. 43, D-5300 Bonn 1.

Konversacia Kurso

Iniciato de GEFA

Bremen (pp) - Germana Esperanta Fervoja Asocio (GEFA) ĵus eldonis perfektigan lernolibron sub la titolo "Konversacia Kurso". Ĝi estas tradukita kaj verkita laŭ la angla originalo "Progressive Fluency Development in Language Learning (P.F.D.)" de Ralph Midgley. La tradukon prizorgis Heinz Dieter Hartig, reviziis ĝin Fritz Lautenbach.

Laŭ H. D. Hartig s-ro Midgley eksperimentas kaj esploras pri novaj, taŭgaj metodoj.

Sur 46 paĝoj la broŝuro prezentas 14 lernerojn, kaj ĉiu lernero konsistas el tri sekcioj. Sekcio A prezentas la materialon. Tiu sekcio ne estas ampleksa por certigi la encerbignon de la materialo. Sekcio B servas al firmiĝo. La esprimoj de sekcio A estas aranĝitaj kiel dialogoj. Sekcio C ekzercas la fluan parolkapablon kaj enhavas nur demandojn de la Sekcio B.

El la antaŭparolo ni citas:

"Lingvo estas travivaĵo - tio devas esti ankaŭ la lernado. Studante lingvon, oni devas senĉese travivi ĝin; ĝis plena posedo.

La lingvo estas same parto de la vivo kiel la spiro - pro tio ni atentu ĉiam la ligan inter lingvo kaj vivo.

Lingvo estas vivo aŭ nenio. Ĉefa trajto de lingvokurso estas evoluo ĝis al perfekta kapablo. Flua parolado de la studata lingvo intimigas kun ĝi.

La dua paŝo post la proprigo de la buŝa modelo devas esti la plena uzo de la lernita lingvo, por ke ĝi vivu. La lingvo devas tuj servi, interŝanĝi ideojn - unue simplajn - sed tamen. Tial partoprenu minimume du personej por starigi dialogon.

La tria paŝo estas la natura transiro de flua parolado al flua skribado. Grave do estas, ke la flua parolado estu la unua paŝo - neniam la skribado."

Formato Din A 5, broŝ., 46 p., prezo 6,-- GM

La Vatikano atendas

"Ĉu la esperantistaro akceptis kun ĝojo la iniciaton de Esperanto-disaŭdigo de la Vatikana Radio?". Al tiu demando, la revuo "Katolika Sento" n-ro 6/1976 respondas prave, ke "kelkfoje enŝoviĝas duboj pri tio", ĉar la reagoj ne estis tiel multnombraj, kiel oni opiniis kaj esperis. Por akiri certecon de interesiĝo, oni devas kalkuli, laŭ Vatikana Radio, pri almenaŭ 500 korespondaĵoj, dum la leteroj de la esperantistoj estis, ĝis nun, eĉ ne duono el tiu cifero. Oni supozis, ke oni facile trovos 500 esperantistojn, kiuj almenaŭ unufoje salutos la novan elsendon, sed tiu espero montriĝis nereala. Estas vere, ke la alvenintaj korespondaĵoj estas tre entuziasmaj, sed tio ne sufiĉas, se oni volas atingi firman pozicion.

Unu el la kaŭzoj de ĉi tiu situacio estas sendube la fakto, ke la horo de la elsendo montriĝis tro malfrua; sed ankaŭ tiuj malfacilaĵoj devas maski leterojn kaj poŝtkartojn, nome por peti pli konvenan horon. Krome oni povas peti la ilustritan programbroŝuron de Vatikana Radio, kiu ankaŭ mencias la Esperanto-Elsendon. Skribu do al Radio Vatikana, Città del Vaticano.

La elsendo de Vatikana Radio okazas unufoje en la semanjo dum la nokto de sabato al dimanĉo, je la 0,30 horo, sur ondo 1529 khz, mezlonga ondo.

Esperanto en la Radio

Zagrebo. Post la kutimaj "Novaĵoj el Jugoslavio" oni povis aŭdi la anoncitan raporton pri la IFEF-kongreso en Skelleftea, bazitan sur la kongresaj bultenoj.

Vieno. Malgraŭ perturboj mi povis sekvi la denove interesan elsendon de Vieno. La komentario de d-ro Alfred Macher parolis pri Aŭstrio kiel "beata insulo". Tiu malnova kliŝo pri Aŭstrio verŝajne tamen entenas iom da vero, opiniis la komentisto kaj laŭvorte diris: "Sed oni ne pretervidu, ke malgraŭ sereno kaj trankvilo ni aŭstroj same multe, same streĉe laboras kiel la homoj en aliaj industri-ŝtatoj. - La kultura felietono temis pri "Nia nova Beatulino - Maria Theresa Ledochovska" verkita de Frato Vincenzo Sagan, Misia Domo Mödling.

Svisa Kurtonda Servo. S-ro Gacond daŭrigis la serion da intervjuoj kun G. Silber, ĉi-foje pri instruado kaj kulturaj aferoj. Ni rememorigas, ke la elsendoj de Svisa Kurtonda Servo nun estas aŭdebla ĉiun labortagon, nome lunde, merkrede kaj vendrede tagmeze je la 13,20 horo, kaj marde, ĵaŭde kaj sabate vespere je la 22,35 horo.

Varsovio. La politikaj komentoj kaj felietonoj ĉi-foje estis dediĉitaj ĉefe al la konferenco de komunistaj partioj eŭropaj en Berlin kaj la elpaŝo de Edward Gierek en Katowice post la eventoj lige kun la intencita ŝanĝo de prezostrukturo de nutraj artikoloj. Ankaŭ en la radia ĵurnalo ĉiutaga oni povis ofte aŭdi pri tiuj aferoj. - Depost longa tempo denove parolis programerojn Mariusz Dastych kaj Andrzej Pettyn; certe multaj aŭskultantoj ĝojis pri tiu reado!

La ĉi-semajna leterkesto alportis interesan statistikon: De la 1.1. ĝis 30.6.1976 alvenis en la Esperanto-Redakcio de Radio Varsovio pli ol 2900 korespondaĵoj. Kompare al la sama tempo de la pasinta jaro tio signifas kreskon je pli ol 400 korespondaĵoj. Je la pinto de la korespondemuloj staras ges-roj Trude kaj Paul Thomas el Auerbach, GDR. En la lasta semajno de junio alvenis 115 korespondaĵoj. - Diskutotemo inter la aŭskultantoj estas ankoraŭ la ripetado de programeroj. - La ĉiusemajna rubriko "El la vivo de PEA" ĉi-foje sin okupis pri la kafejo Esperanto en Szcecin, la renkontejo esperantista. - La Esperanto-Eksprezo alportis novaĵojn el GDR, Finnlando, Pollando kaj intervjuon kun japana esperantisto.